



Kulturaj Kajeroj

É. MAHÉ →

DUMONATA INFOMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : H. MICARD, Prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, ÉPINEUX LE SEGUIN (Mayenne) - Tél. 1 - (Francujo)

J A R A B O N O :

Sendotaj al : Micard Henri
Kulturaj kajeroj
Bonfara : 10 fkoj / Epineux-le-Seguin (Mayenne)
C. C. P. Nantes 2349-62

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pagô 4)

JULIO - AÛGUSTO

1962

4

KULTURAJ KAJEROJ

1962

Julio - Aŭgusto

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 5, boulevard Buisson
Rochefort-sur-Mer (Franc.)

Komitatanoj :

René Watier
Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesata post interkonsento kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

..

Scienco kaj feliĉo (P. Babin).

Esperanto tra la mondo.

Eksterlandano vizitas Francujon :

Kulto de vino (I) (Dov Nir).

Liberaj opinioj :

Pri studo de W. Auld (R. Watier).

Filatelio :

Kelkaj grandaj homoj.

El ie en la mondo :

La argentina « boyero » (Angel M. Corral).

Kuriozaĵoj.

Fantaziaĵo :

Kion faris lia patro - (La Progresanto).

Por via distro :

Nia konkurso.

Bonhumoro.

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

spiegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

H. MICARD.

SCIENCO KAJ FELIĈO

Antaŭ kelkaj semajnoj mi legis la rakonton de Lord Dunsany pri lumsignoj senditaj al la aliaj planedoj : homoj konstruas, en Saharo, luman teoremon de Pitagoro per gigantaj elektraĵoj. La Marsanoj unue respondas prezentante la saman bildon kaj, poste, delokas la diversajn segmentojn, kiuj ĝin konsistigas. Baldaŭ la bildo prezentas pendumilon. La Teranoj komprenas la marsan respondon : « Iru aliloken, kaj estu pendumitaj ! »

Tiu « pesimista » rakonto ne malkuraĝigas la sciencistojn (kiuj eble ne legis ĝin !), ĉar de tiu tempo estis elpensita nova instrumento, la « laseron », kiu, pere de artefarita rubeno, permesas plintensigi la lumon kaj atingi lumintensecon pli grandan ol la sunluma. Estus do eble sendi « lummakulon » sur la surfacon de aliaj planedoj.

Sed al multaj homoj tiuj eksperimentoj ŝajnas tute senutilaj. Ili opinias malsaĝaj kaj danĝeraj la sciencistojn, kiuj « stulte » elspezas tiom da mono, mono, kiu tiom utilis al la ankoraŭ multnombraj teraj malfeliĉuloj. Ili ne komprenas, kiel inteligentaj homoj laboras por elpensi aŭ fabriki grandegajn aparatojn, kies utilo ili tute ne vidas, dum ili mem ne povas elteni la ĉiutagajn zorgojn.

« Oni mortigu la sciencistojn ! » Tion oni kelkafoje aŭdas aŭ legas. Jes, sciencistoj ĉiam staris ĉe la fonto de la milit-instrumentoj. Sed paralele, uzante la rezulton de la esploroj celantaj al detruo, aliaj sciencistoj laboras por malfermi por la homaro novajn fenestrojn. La grandaj eltrovoj montras praktikan valoron en la vivo de ĉiu homo. La hemiaĵoj, la eksplodiloj mortigas homojn, sed ili ankaŭ permesas al aliaj pli bone, pli komforte vivi, ĉar ili helpas en la vivado. La fendado de la atomo permesas grandskalan detruadon sed ankaŭ alportas al la homo novan energifonton.

Mi aŭdas flustrojn : « Jes. Tio estas bela. Tion ni komprenas. Tio okazas sur nia Tero kaj, ĉar ni estas Teranoj tio utilis al ni. Sed, kial provi atingi la aliajn planedojn ? Ĉu ne estas sufiĉe da loko sur nia Tero por ĉiuj ? » Mi tute ne estas certa, ke post kelkaj dekoj da jaroj la Tero estos sufiĉe granda por permesi al la rapide kresanta homaro komforte vivi. Sed eĉ supozante tion ebla, ĉu ne estas entuziasmege la perspektivo malkovri nekonatajn mondojn ? Ĉu tiu ne ŝatas aŭdi kaj legi pri Japanio, kiu eĉ ne

intencas viziti ĝin ? Ĉu vi neniam entuziasmiĝis pri la verkoj de Jules Verne ? Ĉu vi neniam ŝatis, ĉu vi ne ŝatas rakontojn pri la esplorado de nekonataj mondo-partoj ? Ĉu estas tiel malproksima la tempo, kiam niaj praaĵoj pensis, ke ne utilis la trajno, tiu satana eltrovaĵo, ĉar ili ne opiniis utile iri rapide kaj al malproksimaj lokoj ? Ĉu vere vi konsentus iri de Marsejlo al Parizo piede ? Niaj praaĵoj ne konsideris eble viziti Parizon, fabelan lokon, kiam ili logis 300 kilometrojn for de la nacia ĉefurbo. Sed vi deziras viziti, ne aliajn urbojn, sed aliajn landojn. Kial ne aliajn planedojn ? Se kelkaj homoj ne estus forte dezirintaj, dum niaj praaĵoj kontentiĝis per tio, kion ili jam konis, iri pli malproksimen kaj pli rapide aŭ vivi pli komforte, ni, la pranepoj devus vivi, kiel ili vivis : ni devus prilumi niajn ĉambrojn per oleolampoj, ĉerpi akvon el la rivero aŭ el la puto, ekkoni la novaĵojn post pluraj tagoj aŭ eĉ semajnoj, manĝi preskaŭ nur tion, kion ni kreskigus, ktp. Dank'al la elektro la vivo multe ŝanĝiĝis. Tion vi konsideras tute normala. Sed antaŭ cento da jaroj oni primokis tiun eltrovon. Oni opiniis ĝin sentutila, eĉ danĝera. Feliĉe la eltrovintoj ne malkuraĝiĝis. Faraday, la angla fizikisto, al kiu oni demandis : « Por kio utilis elektro ? » respondis per alia demando : « Por kio utilis novnaskita infano ? » Serco ? Ne. Infano, eĉ kiam oni ne bonvole akceptas ĝian alvenon, estas nova paŝo al plua vivo. Vivo estas daŭro, ago, disvolvigo. Ĉiu nova homo ne staras post sia patro aŭ ĉe lia loko, sed antaŭ li. Li estas necese, nova etapo sur la viva vojo. Kien kondukas tiu vojo ? Ĉu estas necese ke ĝi konduku ien ? Ĉu la tempo, la spaco ne estas senfinaj ? Ankaŭ la Vivo estas senfina. Ni tro konsideras nian vivon la Vivro. Nia vivo estas nur parteto de la kosma vivo.

Ĉu ni devas iri tiun senfinan vojon senkonscie aŭ eĉ kontraŭvole ? Libera estas la homo, kiu scias, kien li iras kaj kial li agas. Li devas konsenti ankaŭ pri la rimedoj. Oni diras, ke la homo serĉas feliĉon. Jes. Sed homa feliĉo kuŝas en scio, ne en nescio, ne en ignoro. Nescio estas la feliĉo de la larvoj. La feliĉo ne estas celo atingota. Ĝi estas « motoro ». La vera feliĉo kuŝas en la serĉado de la feliĉo. La Sciencon, kiu antaŭenpuŝas la vivon (aŭ, eble, estas antaŭenpuŝata de ĝi) ni devas konscie helpi eĉ nur per nia deziro de kompreno. Ĝi senhezite iras la vivan vojon, tiun vojon, kiu nun forlasas la Teron kaj direktiĝas al la steloj.

P. BABIN.

Esperanto tra la Mondo



U.E.A. decido pri propagando

La U.E.A.-estraro decidis presigi en franca kaj angla lingvoj, broŝuron titolitan : « Esperanto — Lingvo por Afriko » ; ĝi estos parte rezervita por propagando inter la afrikaj studentoj de eŭropaj universitatoj.

Aliflanke, aŭiso estos eldonita en du formatoj ; ĝi havos spacon por mallongaj naciilingvaj tekstoj.

Utila libreto : « Esperanto en Komerco »

Multaj komercaj kaj industriaj firmoj uzas Esperanton. Tion pravas nova libreto « Esperanto en Komerco », kiu arigas atestojn de tiaj firmoj el 22 landoj. Grava punkto por niaj propagandistoj : tiu eldonaĵo estas presita en kvin lingvoj : esperanta, angla, franca, germana, hispana. Ĝi estos des pli utila kaj la grupoj ne devas malhavi ĝin.

Kongreso de la Esperantistaj Fervojistoj

Pli ol mil esperantistoj el 22 landoj ĉeestis dum Majo tiun tre imponan kongreson en Budapeŝto. Speciala poŝtmarko aperis.

Estas bone aldoni, ke Sro Kossa, hungara ministro de la Trafiko kaj Poŝto estas esperantisto ; li ĉeestis la solenajn kunvenojn de la kongreso. La distra parto estis tre varia : ekskursoj tra la urbo, sur la Danubo, al Norda Hungarujo, al Lago Balaton. Okazis ankaŭ kultura spektaklo.

La 15-a IFEF-kongreso okazos en Majo 1963 en Stoke-on-Trent (Brit.).

Ce la Naturamikoj

T.A.N.E.F., sekcio de la esperantistoj en la laborista turisma internacia asocio « Naturamikoj », estas ĉiam tre aktiva : ĝia bela bulteno « La Migranto » aperas bele presite. Ekzistas perantoj en 11 eŭropaj landoj. Sekretariejo : Frankrijklei 39, Antverpeno, Belgio. Specialaj kunvenoj por la membroj okazas dum la kongresoj de S.A.T. kaj de la « Naturamikoj ».

Nederlanda poŝtstampo pri Esperanto

Dum Septembro, en la 4 ĉefaj nederlandaj urboj, la poŝticejoj uzos por senvalorigi la poŝtmarkojn specialan stampilon pri la 75-a datreveno de Esperanto.

Parlamentaj agadoj

En Italujo, senatano Moltisanti prezentis legproponon por la starigo de nedevegaj oficialaj kursoj de Esperanto en la mezlernejoj.

En Argentino, deputito Luiz Mendez proponis devigan instruadon de la internacia lingvo en ĉiuj lernejoj de provinco Santa Fe.

Subvencio por niaj aktoroj

La konsilantaro por kulturo de la Kroata Respubliko decidis doni por 1962 subvencion de unu miliono kaj duono da dinaroj al la nun bone konata esperantista trupo « Internacia Arta Teatro ».

En Usono

La japana esperantista ĵurnalistino Joŝiko Kajino faris komence de la jaro, 46 prelegojn en Kalifornio ; intervjuoj okazis en diversaj ĵurnaloj kaj la radio de San Francisko dufoje raportis.

Nova vigla klubo agadas nun en Pitsburgo, la « urbo de ŝtalo ». Pli ol 300 personoj, inter kiuj geinstruistoj, ĉeestis multajn kursojn.

Intervjuo ĉe franca radio

La radiostacio « Radio Bretagne » dissendis mallongan intervjuon de Sroj Roland Dupuis, de Stokholmo kaj Lutogniewki de « Radio, Varsovio » kiuj partoprenis en la somera kultura restado en la Esperantista Kulturdomo Grésillon.

La rondo de « Grajnoj en Vento » por instruistaj studentoj startis

Seminarioj, porinstruistaj lernejoj, kunligu viajn Esperanto-klubojn ! Tuj post la libertempa sezono kontaktu la klubon de Ljubljana (en porinstruista lernejo), kiu aperigos la komune redaktitan bultenon. Adreso : Esperanto-grupo Uĉiteljiŝče, Resljeva c. 12, Ljubljana, Jugosl.

Pluraj noveloj de la japana verkisto Mori Oogai devas baldaŭ aperi en Tokio, tradukitaj de pluraj esperantistoj, sub la titolo : « Rakontoj de Oogai ».

Ĉina Esperanto-Ligo preparas pligrandigitan reeldonon de la noveloj de Lusin, fama ĉina verkisto.

En Kanado

Aperis anglalingva informnumero de « Kanada Esperanta Revuo » kun 44 paĝoj.

(Bonvole sendu la materialon por tiu-ĉi kroniko al : Sro Frangeul, 42, rue du Pré-Pigeon, Angers, Francujo).

KULTO DE VINO


(unua parto)

*Madejra kaj ŝampanja
Ne malbona mark'
Eĉ vi, vino hispana
Kun via fajra spark'
Kaj plej sincera klino
Al vi, vino burgunda,
Al vi, unika vino!
(El franca popola kanto)*

En Dijon estas antikva puto. Ĝia nomo estas « Puto de Moseo ». Ĝi estas sesangula konstruaĵo, en kies centro staras lignaj statuoj de niaj profetoj Jeremia kaj Jehezkel. En malsupra parto de la konstruo troviĝas akva surfaco, ĝi estas antikva puto de la dekkvina jarcento. Ĝia akvo brilas, eĉ se ne blovas vento en tiu ĉi duonfermita domo. Ĝi sparkas pro la miloj argentebrilaj moneroj, kuŝantaj sur fundo de la puto. Ankaŭ ĉi tie, kiel en multaj lokoj de la mondo, oni kredas, ke ĵeto de monero en akvon estas rime-do por denova veno en tiun ĉi lokon. Ne estas mirinde, ke multaj enĵetas moneron en tiun ĉi puton kaj ankaŭ mi tiel faris, ĉar estas neeble ne deziri, ke oni revenu ankoraŭfoje en tiun ĉi plej belan kulturen pejzaĝon de Francujo en Burgundon.

Dijon ne estas provinca urbo. Se mi diros al mia plej bona amiko, ke li estas provinculo, ĝis eterno li ne pardonos al mi tiun ĉi ofendon. Ĉiu el ni deziras esti homo de la granda mondo kaj ne provinculo, kiu koncepto estas ligita kun letargio, dormemo, limigita horizonto, manko de fantazio. Se estas tiel tiam Dijon vere ne estas provinca. Ĝi havas sian propran vivon, ĝi havas siajn proprajn fortojn, el kiuj ĝi suĉas, ĝi havas pasinton, ĝi havas estanton, ĝi havas estonton. Ĝi ne estas « la malriĉa parenco » de Parizo, iu strabanta ĉiam al la flanko de la riĉa parenco kaj ĝuanta de ĝia giganteco. Ne. Dijon havas grandan pasinton, ĝi estas urbo de la burgundaj princoj. Ĝi havas estanton : ĉefurbo de burgunda vino, sed ne de vino de la festoj, kiel estas vino ŝampanja, sed de bona vino, ruĝa, rozkolora kaj blanka, kia al ĉiu homo sin estimanta estas

necesas almenaŭ dufoje dum la tago, al la du ĉefaj manĝoj. Ĝi ne estas produkto de lukso por nemultaj, sed eminenta kvalito por amasoj, pri kiu fieras Burgundo. Kaj la



(Foto S.I. Dijon).

estonto? Rigardu nur supren en la ĉielon! Ĉiam novaj grupoj de ĵetaviadiloj fulmas sur la firmamento, levas sin vertikale kaj denove mergiĝas laŭ rapido preskaŭ neimagebla. Dijon estas unu el la plej gravaj aerbazoj de Francujo. Tamen ĝian estonton oni devas serĉi ankaŭ sur la firma tero kaj eĉ sub la tero. Ni turnu nin iom suden de Dijon en direkto de Argilly kaj jen, ni estas en kampoj de Burgundo, kie oni boras nafton.

Dijon ne estas do provinca urbeto, ĝi estas urbo, kiu vivas sian vivon.

Palaco de la burgundaj princoj enhavas hodiaŭ en si la urban muzeon. Se ni ĝin komparas kun Louvre, tiam ni, la komparantoj, estas provinculoj. Kiel oni povas postuli de malgranda urbo tian aferon? Tamen



tiu ĉi muzeo estas muzeo, kiu meritas viziton. Kiu vidos tie la amason de flandraj pentraĵoj de la deksepa jarcento, tiun ekokupas la penso, kiel ĝuste tiu ĉi speco de pentraĵoj venis tien ĉi. Ĉu enigmo? Kiu mobilizos siajn sciojn, komprenos. Tra ĉi tie ja pasis la vojo de la Mediteranea maro al landoj, kiuj konstituas hodiaŭ Belgujon kaj Nederlando, kiam estis necertaj tagoj pro maraj rabistoj kaj la vojo sur la seka tero estis gardata de dukoj kaj princoj burgundaj.

Jen orizitaj lignoskulptaĵoj sur princaj tomboj. Kiel granda estis la pacienco de tiuj ĉi metiistoj-artistoj el tiuj jarcentoj. Ĉiu kapo havas sian esprimon, ĉiun drapon oni povas palpi, nenie vi trovos laboron senintencan aŭ unuformecan, nenie estas ia fiksa ŝablono. Ĉu troviĝas ankaŭ dum niaj tagoj artisto, kiu estas preta dediĉi tiom da sia tempo al lignoskulptaĵoj? Domaĝe, en lignoarto kaj en arto ĝenerale ne plu estas pacienco.

Tri cent dudek du ŝtupoj kondukas al supro de la turo en palaco de la burgundaj princoj. Tegmentoj, tegmentoj, kien ajn vi rigardas, nigraj tegmentoj, koloraj tegmentoj. La tegmentoj estas abrupte krutaj kun

tre akuta firsto, tegmentoj de fabela urbo. Tio tamen estas nur en nordo de la urbo. Sude gigantaj domoj dekkvinetagaĵa, poemo en betono kaj vitro. En okcidento de la urbo — domo de la antikva universitato. Ni diris ja, Dijon ne estas provinca, ĝi posedas ankaŭ spiritan sendependon.

Mian atenton tamen vekas unu malgranda konstruaĵo: ĝia tegmento estas volbita, ĝian turon oni apenaŭ povas nomi turo, kruco ne surestas. Jes, tio estas la antikva hebrea preĝejo de hebrea civito ne plu ekzistanta. « Mi faris multon por konservi domon de la preĝejo », diris al mi urbestro de Dijon, kiam li min gastigis per tiel nomata honora vino. « Mi helpis ankaŭ al multaj hebreaĵoj akiri falsajn dokumentojn ». La urbestro estas pastro. Sian benon super la vino li ŝanĝas en momento, kiu ŝajnas al li konvena, en laŭdon de ĉiuj idealoj de Francujo. Jen li, samtempe urbestro, katolika pastro kaj membro de la parlamento, prononcas sian benon, estante dekoraciita per rubando de franca trikoloro.

Mi sentis min en Burgundo preskaŭ, kiel hejme, tiu ĉi teritorio estas longforma profundigo kaj kio koncernas la fortojn, kiuj ĝin kreis, ili estis la samaj fortoj, kiuj kreis la valon de Jordano. Tamen tiu ĉi komparo estas nur teoria, la pejzaĝo absolute diferencigas de la pejzaĝoj en nia lando. Tie ĉi la klimato estas benata per amaso da pluvoj en ĉiuj jarsezonoj. La riveretoj, kiuj trafas la regionon laŭ ĝia longo kaj larĝo kreas tiun ĉi freŝan kaj riĉan verdaĵon sen neceso, ke homo klopodu kaj igu ĝin floranta. Kontraŭe, la homo kapablas ĝin difekti, se li ne konformiĝas al la ritmo de la naturo. Sole unu simileco memorigas, kion havas komunan la Jordan-valo kun la valo de la rivero Saône: la elstarajn deklivojn okcidente de la valo. Estas brile blankaj kretaj deklivoj inter la verdo de arbaroj kaj de kampoj. Tiuj ĉi deklivoj estas ja la « côtes » kun ĝiaj diversaj nomoj, tio estas la lokoj, kies abruptaj deklivoj povas akcepti sunan radiadon abunde kaj tial tiuj ĉi deklivoj estas regionoj de vitĝardenoj. (daŭrigota).

DOV NIR.

Esperanto as a literary language

by William Auld M. A.

(a study published on the occasion of the 75 th anniversary of the publication of the book « Internacia Lingvo — London 1st January 1962).

En la serio de la dokumentoj publikigitaj de C.E.D., aperis komence de tiu-ĉi jaro interesa studo de nia tre kompetenta samideano W Auld. Direktita al anglalingvaj kleraj personoj, la dokumento estas pledo pri la literatura valoro de Esperanto kaj sekve por la lingvo mem. Ĉar certe neniu el niaj legantoj dubas pri literatura valoro de nia lingvo, mi ne bezonas traduki laŭvorte la diversajn partojn de la tute trafa pritraktita studo. Mi ĝin nur resumas kun klara sento pri la neebleco redoni en kelkaj linioj la nuancajn pensojn de Magistro W. Auld.


Ĉiuj lingvoj povas havi literaturan valoron, inkluzive tiuj el « malpli larĝa disvastiĝo ». Kun literatura valoro la malpli disvastigitaj lingvoj kontribuas al ĝenerala homa kulturo. Lingvo estas tia, kia ĝin faras ĝia uzantoj kaj rilate al Esperanto, de la komenco aperis literatura tendenco.

Resumante la evoluon de la angla lingvo, la aŭtoro montras ties pliriĝon, ĉefe dank'al Spenser kaj Shakespeare kaj tio spite la kontraŭstaron de la konservativuloj. La pliriĝo de la angla lingvo okazis per granda alprenado de heterogenaj elementoj kaj « **precize tiu multflanka deveno estas la plej laŭdata kvalito de la angla lingvo** ». Aliaj lingvoj kun pli freŝdata evoluo fariĝas kulturaj per la sama procezo. Resume iu lingvo en kiu kulturaj verkoj povas esti kreitaj estas konsiderinda, kiel literatura lingvo. En sekvanta ĉapitro la aŭtoro analizas la tri karakterojn de literatura valoro : reputacio, semantiko, tradicio.

Dum neniu kuraĝas aserti, ke iu malgrande konata lingvo ne povas havi kulturen valoron, estas facile por obstine mallarĝvidaj personoj nei la kulturen valoron de Esperanto. Lingvo havas semantikan valoron en la mezuro laŭ kiu la literaturo donis al ĝi riĉecon kaj esprimpovon. La kultura valoro kuŝas ankaŭ en la tradicio li-

verita de la tekstoj do de la aŭtoroj. De post ĝia kreiĝo Esperanto ricevis riĉan trezoron da literaturaĵoj el ĉiuj partoj de la mondo. Se la modernaj komunikiloj helpas por unueca tendenco inter la lingvoj, tamen la angla lingvo ne etendiĝas eksteren el sia sfero. Male Esperanto utilis kiel literatura ponto inter la naciaj lingvoj, konservante sian unuecan karakteron. Oni ofte konsideras la duflankan aspekton de literaturaĵoj en Esperanto tradukaj kaj originalaj verkoj. Ne devas esti prefero por la unuaj aŭ la duaj ĉar ambaŭ havas reciprokan efikon. La bona utilo de tradukaj verkoj estas la diskoniga povo de naciaj nekonataj verkoj. Sed en sia formo la naciaj verkoj havas ofte nacian karakteron, nacian kapablon rebrili lokajn karakterizaĵojn, dum Esperanto emas esti supera rimedo por esprimi tutmondajn homajn pensojn. Pro tio ĝi ne bezonas traduki fidele lokajn esprimmanierojn aŭ nuancojn inter klasoj de socio en iu nacio.

Pri vortmaterialo, male al la vana pretendo de « Basic English » pri granda redukto de la uzeblaj vortoj, Esperanto estas la taŭga bazo de riĉa internacia vortaro. Daŭrigante sian studon, Sro Auld analizas la nunan staton de la Esperanta literaturo, montrante ke sen distingo pri deveno el ĉiuj partoj de la mondo, la aŭtoroj alportis riĉan kontribuon de poemoj, noveloj kaj teatraĵoj. La fino de la studo pritraktas la flekseblecon de la esperantlingvaj derivado kaj gramatiko, la riĉecon de la semantiko dank'al la aglutineca karaktero. La lasta ĉapitro montras la ekziston de riĉeco de rimoj en la poeziaro.



Magistro W. Auld estas sufiĉe konata de esperantistaj rondoj, por ke ni ne bezonu emfazi la gravecon de lia studo, kies kvalito estas an-

koraŭ pli signifa dank'al la multaj referoj al seriozaj verkoj kiujn li aldonis je piednotoj. Sajnas al mi pli interesa eltiri kelkajn rimarkojn el la publikigo de tiu dokumento.

Jam la Centro de Esploro kaj Dokumentado eldonis plurajn informajn studojn en naciaj lingvoj. La eldono en angla lingvo estas tre utila ĉar ne nur ĝi tuŝas anglalingvajn personojn, sed oni ne povas nei, ke la angla lingvo estas monde diskonigita almenaŭ en sferoj de kleruloj, spite al la aserto de Sro Auld ke « ĝi ne etendiĝis eksteren el sia sfero ». Estas ja konata fakto, ke intelektuloj ekster Britujo Usono kaj landoj de Commonwealth, ankaŭ konas la anglan lingvon **almenaŭ skribe**, do ke studa raporto en angla lingvo povas efiki, eble eĉ pli grave en ne anglalingvaj landoj. Laŭ la konata proverbo ke « neniu estas profeto en sia lando », en ia lando, dokumento de fremda deveno skribita en lingvo tamen sufiĉe disvastigita povas esti serioze priatentita. Mi jam skribis ĉi tie, ke Esperanto anstataŭ resti sola en fermita cirklo havus profiton sin apogi sur pluraj disvastigitaj naciaj lingvoj.

Konsiderinte la plejparte bonegan argumentaron de Sro Auld, mi tamen trovas punkton kun kiu mi ne povas konsenti. Pri la fakto, ke la angla moderna lingvo havas heterogenan vortprovizon neniu dubas, sed ke tio estas laŭdinda kvalito, jen diskutebla afero. Ne konsiderante la politikan aspekton de la demando, oni povas pensi ke la angla lingvo neniam atingas tutan gradon de mondiskonigo pro du internaj kaŭzoj : unue la komplikeco de la fonetiko kaj de la ortografio, due la troa riĉeco de la verkaro kaj esprimaro. En tiu lasta punkto kuŝas la konflikto inter literaturamantoj kaj praktikaj lingvouzantoj. Ekzemple la anglalingva raporto pri kiu temas, krom ia paragrafo citanta « The Shepherdes Calendar » (London 1579) en malnova lingvo, estas por neangla persono facile legebla ĉar ĝi estas skribita en bona sed ĉiutaga angla lingvo. Sed ofte literaturistoj emas uzi nekutimajn vortojn, arkaismajn formojn aŭ specialajn dirmanierojn, tio por esti pli originala aŭ pli eleganta. Pro tio, fremdulo, kiu lernis alilandan lingvon en la lernejo ofte ne kapablas kompreni literaturajojn de la koncerna lingvo. Pri la germana lingvo, citinde

estas verkoj de Thomas Mann tiel « arte » lingvaj, ke foje eĉ Germanoj havas penon ilin legi. Samaj ekzemploj en modernaj francaj literaturajoj ne mankas. El tiu fakto ni konkludu ke literatura karaktero estas ofte kontraŭa je universalismo de lingvo. Lingvo kiu volas esti universala devas resti simpla kaj ĝia vortaro limigita. Ĉu Esperanto-verkintoj ĉiam komprenis tiun regulon? La demando estas dubiga. Tio ne volas diri, ke universala lingvo devas redukti sian vortaron al tiu de Basic English, kiu aperas, kiel karikaturo de angla lingvo, ankaŭ ne al tiu de la primitivaj 900 radikoj de Esperanto. Sed la troa literaturigemo povas malutili ankaŭ al nia lingvo, kiu devas resti atingebla en la tuta mondo de homoj ne povantaj dediĉi longan tempon al studado de eleganta sed multforma vortaro.

Oni povas ankaŭ konstati, ke se Esperanto konis riĉan literaturan disvolvigon, el tio ne rezultis la tuta perfektigo de la lingvo laŭ kelkaj praktikaj vidpunktoj. La demando pri « ujo-io » restis nesolvita (tion oni povas konstati sur la dua paĝo de la pristudita dokumento de C.E.D.). La mal-vortoj restis nekontesteble malforta punkto de la lingvo Esperanto. La pezaj « malsupreniri — malpli — grandiĝi — mallongigi — malvarma » ktp. restis en la uzado spite al moderna tendenco de simpligo en naciaj lingvoj. Tiuj bedaŭrindaj faktoj devenas de la preskaŭ senescepta regado sur la lingvo Esperanto de literaturamantoj, religiemuloj, filozofiemuloj kaj ĉiuj aliaj abstraktemuloj (x), dum la praktika mondo metia, komerca, kiu fakte estas la motoro por la baza evoluo de iu lingvo, ne multe okupiĝis pri Esperanto.

Sed tiuj ĝeneralaj konsideroj tute apartaj neniel deprenas meritojn de Sro Auld nek de C. E.D. en la redaktado kaj diskonigo de la ĉi supre analizita dokumento.

R. WATIER.

(x) — La superregado de abstraktaj nocioj en Esperanto estas pruvita ekzemple de la fakto, ke la Akademio agnoskis la sufikson « end », tute abstrakta nocio de « devo », dum ĝi ne okupiĝis pri akcepto de la vorto « kurt- » (kurta, kurtigi, ktp.) praktika vorto en la vivo.



Kelkaj Eminentuloj

Ĉiujare la Francaj Poŝtoj, kiel alilandaj Poŝtoj, eldonas serion de specialaj poŝtmarkoj por honoru kelkajn eminentulojn. Tiamaniere la poŝtmarko utilas, kiel memorigilo. Tre ofte oni bone konas la titolon de verkaĵo, muzikaĵo, skulptaĵo au pentraĵo, oni ĉiutage uzas iun aparaton aŭ iun kuracilon, sed la nomon de la verkisto, komponisto, skulptisto, pentristo aŭ eltrovinto oni tute forgesis. Dank'al la poŝtmarko multaj eminentaj homoj revivas.

Ĉi sube ni prezentas la lastaperigitan serion.

Edme BOUCHARDON : fama franca skulptisto, kies plej konataj artaĵoj estas la Fontano de la strato Grenelle, en Parizo, kaj diversaj skulptaĵoj en la parko de la Kastelo de Versailles.

Joseph LAKANAL : konvenciano kaj scienculo ; li multe kontribuis al la kreado de sciencaj kaj beletraj establoj kaj multe laboris favore al la Publika Instruado. En 1816 li estis devigata ekziliĝi al Usono kaj revenis Francujon nur en 1833.



Gustave CHARPENTIER : franca komponisto, originala kaj vigla. Liaj plej konataj komponaĵoj estas : Louise (miksopero) kaj la orkestrosuitoj : Impresoj pri Italujo, La vivo de la poeto, la Kronado de la Muzo.

Denis PAPIN : franca fizikisto, kiu, la unua, esploris la elastan forton de la akvo-vaporo. Elpelita el Francujo per la Nantes-edikto li eksperimentis en Germanujo kvar-padelfradan ŝipon. Li ankaŭ elpensis la « Papin-marmiton » kaj diversajn aparatojn por konservi la nutraĵojn.

Edouard ESTAUNIE : Inĝeniero kaj verkisto, membro de la Franca Akademio, Liaj plej famaj verkaĵoj estas : la Premsigno, La Aĵoj vidas, La Supreniro de Sro Baslevre, Soleco, la Kriplulo kun lumaj manoj.

Hyacinthe VINCENT : milita kuracisto. Oni ŝuldas al li la kontraŭtifoidan vakcinadon, serumon kontraŭ la gangreno, serumon kontraŭ streptokokan. Li estis membro de la Instituto kaj de la Akademio de Medicino.

EL IE EN LA MONDO

La Argentina “ Boyero ” (Bovkondukisto)

Unu el la homoj plej karakterizaj de la argentina kamparo estas la « boyero » (boyero). En lando kiel la nia kun preskaŭ tri milionoj da kv. kilometroj, la distancoj estas senfinaj. Ĉiam rajdanta sur ĉevalo, lia plej bona amiko kaj helpanto, ĉiaokaze akompanata de kelkaj hundoj, la « boyero » kondukas aron de brutoj (100, 200 aŭ pli) ĝis celita loko. La daŭro de la marŝado povas esti du, tri tagoj aŭ eĉ pli. Tiuj amasaj trans-



Bivakante en plena kamparo ili sin nutras per rostiginta viando preparita laŭ kreola maniero.

lokiĝoj okazas pro la daŭra sekeco en la loko, kie la brutaro paŝtas aŭ pro la aĉetado de la brutoj fare de la grandaj entreprenoj de la viandindustrio. Kiam tio eblas la translokiĝo okazas pere de trajnoj aŭ ŝarĝaŭtomobiloj sed plej ofte, pro la longaj distancoj aŭ la manko de vojoj, kiel en la tempo de niaj avoj : piede.

Sed mi revenas al mia unua ideo : la prikskribo de la laboro kaj de la kutimoj de

tiom utilaj kaj tipaj kamparanoj de nia lando. Oni aĉetas la brutaron en koncentrejoj, kie ili estas publike aŭkciataj. Ek de tiu momento komenciĝas la laboro de la « boyeroj ». Rajdantaj viglajn ĉevalojn, ili komencas stimuli per specialaj krioj, la elpeladon de la gebovoj aŭ geŝafoj, laŭ la cirkonstancoj, bone helpataj de inteligentaj kaj speciale trejnitaj hundoj kune kun la persekutado de la « boyeroj », ĝis la besto reprenas la ĝustan vojon. Kiam la brutoj vidas aŭ trovas ion nekutiman sur la vojo, ili haltas. Okazis al ni mem stranga fakto : preterpasis brutaro antaŭ la domo kie ni loĝis. Ni rigardis de la pordo. Subite la brutaro haltis. La « boyeroj » svingis siajn skurgojn kriante, ke ni devas malaperi de antaŭ la domo. Vere, en la unua momento mi ne komprenis la sintenon de tiuj homoj, sed poste ili klarigis, ke la brutoj, vidante min en bankostumo, ne kuraĝis antaŭeniri. La kondukado de la brutaro, meze de krioj kaj de la bojado de la hundoj, sub nuboj de polvo, jen la tasko de tiuj homoj dum du, tri sinsekvaj tagoj, ĝis la atingo de la fervojstacio aŭ de iu alia difinita loko, kie la brutaro devas resti. Se, vespere, ili ne atingas vilaĝon, ili tranoktas eksterdome en la kamparo. Kolektinte arbajn lignaĵojn ; ili bivakas ĉe la lumo de la fajro manĝante rostitan viandon kaj trinkante mateon. La rostita viando estas nomita « asado con cuero » (rostita viando kun felo). Vi vidos sur la ilustraĵo, ke oni alkroĉas la viandon ĉe speco de fera kruco klinita super la fajro. Ĉiu « boyero » siavice detranĉas pecon de viando. Mi forĝesis diri, ke la « boyeroj » kaj ĝenerale ĉiuj argentinaj kamparanoj, portas tranĉilon ĉe la zono. La argentina trinkaĵo estas la sudamerika teo : la mateo. Oni trinkas, aŭ pli precize oni suĉas ĝin. Oni

duonplenigas specialan sekigitan kukurbe-ton per mateo kaj oni enverŝas varman ak-von. Pere de speciala metala suĉilo (vidu la ilustraĵon) oni elsuĉas la mateon laŭvice, ĉiu per la sama « aparato ». Tiu kutimo estas tiel enradikiĝinta, ke kiam vizitanto alvenas en iun ajn domon en la kamparo subite aperas fraŭlino aŭ iu loĝantino de la domo, kiu proponas mateon, kiel pruvo de amike-co. En vilaĝoj kaj eĉ en kosmopolitaj urboj, kiel Buenos Aires oni povas observi « mateumantojn » sidantajn apud la sojlo de sia domo ; eĉ en la trajnoj vi vidos familiojn portantajn ĉion necesan por « mateumi » kaj varman akvon en termosoj. Kurioza konstato estas, ke preskaŭ ĉiuj eksterlanda-noj adaptiĝas al tiu kutimo. Jam de la mal-

kovro de Ameri-ko, la jezuitaj pastroj konstatis, ke la Indianoj « mateumis » ; la nura diferenco estis ke, anstataŭ metalan ili uzis lignan kanon por suĉi.

Unu el la plej gravaj industrioj estas tiu de la viando bova, por-ka aŭ ŝafa ; an-kaŭ la plej utila kaj fruktodona laŭ financa vid-punkto. Konata estas en Eŭropo

povas imagi, ke por nutri tiom grandan kvanton da brutoj la kamparaj bienoj devas havi grandegan surfacon. Ili plej ofte havas surfacon de 50, 100 aŭ pli da kv. kilometroj. Por la grandbienuloj estas pli facile sin de-diĉi al viandindustrio ol al agrikulturo. Por la unua ili bezonas nur « boyeroj » ; por la dua ili bezonas maŝinojn, specialigi-tajn laboristojn kaj taŭgajn instalaĵojn ; kontraŭe la brutaro restas tage kaj nokte sur la kampoj. Ili zorgas nur pri la krucado de la diversaj rasoj, ĉar la « Hereford » aŭ « Shorthorn » rasoj de angla deveno valoras milojn da dolaroj.


Jen unu flanko de la vivo de la argen-tina popolo.

Angel M. CORRAL.



Kamparano suĉante mateon

la argentina viandindustrio, plej grandnom-bre regata de anglaj entreprenoj. Miloj da bovoj, porkoj kaj ŝafoj estas ĉiutage buĉitaj por eksportado. Kelkaj milionoj el ĉiu speco ekzistas en la argentina kamparo. Oni do



Kuriozaĵoj

... EL EŬROPO :

Tiu ŝakludejo estis aranĝita en publika parko en la germana urbo Stuttgart. La gapantoj ne malpli interesiĝas pri la ludo ol la ludantoj mem.



... KAJ EL AZIO :

Tiu viro, vestita laŭ la antikva modo, estas la lasta falkisto en Japanio.

FANTAZIAJO

Kion faris lia patro

En normalaj cirkonstancoj mi certe ne ekhavis la ideon eniri la izole situantan hoteleton « La Ruĝa Rajdisto », ĉar Schmidt, la malgranda posedanto, estis konata, kiel parolema kaj kalamuniema, kaj krom tio li postulis ekstreme altajn prezojn por siaj manĝaĵoj, kiujn li laŭkutime tamen sciis bonege prepari. Li do ne estis agrabla homo, sed longa vojo tra soleca regiono kuŝis antaŭ mi, kaj la akra malvarmo akompanata de froste tranĉaj neĝblovoj kvazaŭ pelis min en la direkto al « La Ruĝa Rajdisto », kie min laŭscie atendas agrable kraketanta fajro kaj bona manĝo.

La malgranda hejmeca gastejambro estis tute senhoma, kion mi bedaŭris, ĉar pro tio mi estis viktimo de la parolemo de la malgranda Schmidt, kiu tuj superŝutis min per siaj tradiciaj plendoj pri pasantaj almozuloj kaj vagistoj. Kiam fine mi povis komenci la fortigan manĝon servitan al mi, Schmidt, publiĝinte la malvirtojn de la nemultaj najbaroj, estis ĉe la fino de siaj paroloj. Nun komencis regi vere agrabla sfero; aŭdeblis nur la kraketado de la fajro kaj la blovbruado de la neĝo ekstere.

Subite la kvieton rompis bruo sur la pordo, kiu tuj poste estis puŝe malfermata. Giganta figuro aperis en la pordaperturon kaj, deskuinte de si la neĝon, eniris la gastejambon.

Per si mem la nura eniro de nova gasto ne povis esti kaŭzo por maltrankviliĝo, sed malgraŭe mi vidis Schmidt, jam tremanta pro timo kaj ankaŭ mi sentis neniom agrabla. Ne mirige! La timige imponaj proporcioj de la eniranta giganto, liaj tute ĉifonaj vestoj, sed precipe la evidente ataka sinteno, kun kiu li prenis pozicion antaŭ la gastejestrone, ne antaŭsignis ion bonan. Dum la nun sekvantaj momentoj da preta silento mi povis atente rigardi la kontraston inter la du viroj, starantaj unu kontraŭ la alia. La ĵusveninto, kies muskolaroj klare konturiĝis, per minaca rigardo ŝajne senigis je la parolpovo malgrasan, malfortikan Schmidt, kies profilo estis kvazaŭ rodbesta. Poste basa, kruda voĉo rompis la silenton.

« Jen, ratvizaĝulo, mi diru al vi klaran parolon. Ne monon mi havas, sed terure fortan malsaton. Donu al mi ion por manĝi, se ne, mi faros, kion faris mia patro, kiam oni rifuzis al li manĝon! ».

« Via patro,... via patro, « Schmidt fine povis balbute eldiri.

« Certe, mia patro. Tiu viro konsciis pri sia propra forto, kaj oni diras, ke mi similas lin. Sed rapide, ĉar mi malsatas kaj malspacienas! ».

Mi pripensis, kion mi faru. Esti klare, ke perforto ne estas aplikebla kontraŭ la sintrudanto. Pro timigo Schmidt apenaŭ povis resti staranta surpiede, kaj komenci sola batalon kontraŭ tiu ĉi amaso da muskoloj donis al mi perspektivon nur pri grava korpa leziĝo. Do, intencante serĉi helpen en la proksimo, mi ekstaris, sed la krudulo, divenante mian intencon, boje kriis al mi: « Sed restu sidanta, kara amiko; por kio necesas, ke vi devigu min imiti la ekzemplon de mia patro? ». Kion alian mi povis fari, krom resti sidanta kaj rigardi al Schmidt, kiu, pelate de sia nova gasto, senĉese servis al li per novaj kvantoj da nutraĵoj, kiuj formangiĝis en mirige mallonga tempo.

Ciujmomente ŝajnis, ke la grandaj, krudaj manoj de la giganto frakasos la tranĉilon kaj forkon, kiujn li uzis.

« Vi meritas pli da honoro per viaj manĝaĵoj ol per via aspekto, kara sinjoro! » fine li diris al Schmidt komplemente, « sed mi vere tre multe mirus, se vi ne havus botelon da bona gustata vino ». Kiam la gastejestro, kies avareco ŝajne estis superanta lian timon, momenton hezitis la brutulo base kriegis al li: « Sed iom rapidu kun via vino, por ke ne necesu, ke mi denove aludu al vi pri mia patro! ».

Finfine la terurulo satiĝis; ekstarinte li paŝis al la pordo. Tiujmomente mi supoze rimarkis iom malpli malfablan trajton sur la ruĝa vizaĝo de la nebonvena gasto, kaj efektive sciola pri la sorto minacinta nin, mi aŭdacis demandi: « Sed diru al mi, kion do faris via patro, kiam oni ne donis al li manĝon? ». Je mia mirego la giganto ekridegis. Metante manon grandan, kiam ŝafofemuro sur mian ŝultron, li diris afable: « Sed kara homo, tio ja ne estas malfacile divenenda! La kompatindulo kun malplena stomako reiris en la malvarmon! ».

El « La Progresanto ».

POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO

Jen la solvo de la ĉefaj problemoj :

Vortoj anstataŭigotaj (1-62)

Razpopovci estas malgranda vilaĝo nur el 50 domoj. Laŭ **sia** situacio ĝi per nenio diferencigas de la plej parto de la vilaĝoj, dissemintaj sur la nordaj deklivoj de la **meza** parto de la Balkanmontaro, famaj **per siaj** puraj domoj, bone ordigitaj kortoj kaj fruktĝardenoj. Sed ĝi **iam delonge** estas konata kiel unu el la plej viglaj vilaĝoj en la regiono. La Legosocieto kaj la teatro estis fonditaj en 1881, nur tri jarojn post la liberigo de la lando **el sub** la turka jugo. La unuaj aktoroj, vilaĝanoj, lernantoj, instruistoj fondis ankaŭ klerigan societon, **elektis** specialan komisionon, specon de **belarta** konsilantaro, kiu devis difini la repertuaron kaj distribui la **rolojn**. Dum kelkaj jarekoj prezidanto de la komisiono estis la instruisto Petkokoev, kiel nobla figuro de kleriganto, kun bela biblia barbo, por ĉiam restis **daŭre** en la memoro de ĉiu, kiu estis vidinta lin. Laŭ Ivan Popov.

Frazoj korektotaj (2-62)

1. — La gepatroj de Jozefo tre ĉagrenigis pro lia maldiligenteco.
2. — Mi kredas, ke homo plene vivas nur, kiam li havas kreaĵojn el **sia** ĉiutaga laboro.
3. — Mia filo estas soldato kontraŭ **sia** volo. (korekta frazo).
4. — La kvanto de ŝanĝoj en la manuskripto estas tre granda.
5. — La grandega nigra hundo montris al mi siajn dantajn dentojn. (Korekta frazo).
6. — En tiu tempo oni ne vidas tiom da novaj konstruaĵoj, kiel nun.
7. — La estraro esperas, ke ni kune havos agrablajn, lernigajn kaj amuzajn vesperojn.

Teksto korektota (6-61) :

Ludovikino alportis al la geknaboj po du terpomojn. Kiam venis la vico de Kristof, tre ofte restis nur tri sur la telero, kaj la patrino ankoraŭ ne ricevis sian parton. Li sciis tion de antaŭe : li estis kalkulinta ilin, antaŭ ol ili venis al li. Tiam li kolektis siajn kuragfortojn kaj diris kun indiferencia mieno : « Nur unu patrino ». Si malkvietigis ion : « Du, kiel la aliaj. » — « Ne, mi petas : nur unu. » — « Ĉu vi ne malsatas ? » — « Ne, mi ne tre multe malsatas ». Sed ĝi prenis ankaŭ nur unu, kaj li zorgis senŝeligis ĝin, disdividis ĝin je tre malgrandaj pecoj, penis por manĝi, kiel eble plej malrapide. Lia patrino observis lin. Kiam li estis fininta : « Nu, prenu do ĝin ! » — « Ne, patrino ». — « Nu, vi estas do malsana ? » — « Mi ne estas malsana sed mi sufiĉe manĝis ». Tamen suferis Kristof. Lia fortika stomako suferegis : kelkfoje li

tremis, sentis kapdolorojn. Li ŝajne havis truan en la brusto, truan kiun turnigis kaj plilarĝigis, kiel borileto, kiun oni estus enprofundiganta ; sed li plendis pri nenio ; li sentis sin observata de **sia** patrino kaj li, faris indiferentan mienon.

Laŭ R. Rolland (trad. G. Hugot-Raison).

Klasado de la konkursintoj : (maksimumo : 156 poentoj)

1. Sro Maurin, Cauderan (Gironde), 139 poentojn (gajnas dusemajnan senpagan restadon en Gressillon).
2. Gesroj Lanz, Parizo, 139 poentojn (sed pli malbone sukcesis koncerne la akcesoran demandon). (Gajnas unusemajnan senpagan restadon en Gressillon).
3. Sino Lenel, Hazebrouck (Nord), 120 poentojn.
4. Fino J. Carré, Villefranche-sur-Saône, 117 poent.
5. Sro Salasc, Béziers, 114 poentojn.
Sro Ligo, Valenciennes, 114 poentojn.
Sro Suchureau, Parizo, 114 poentojn.
Sino Laurie, Bournemouth, 114 poentojn.
9. Fino Arnould, Chaumont, 106 poentojn.
10. Sino Benazet, Argeles-sur-Mer, 104 poentojn.
ktp...

ATENTU : Nova konkurso komenciĝos kun la 5-a numero. La konkursantoj devas sendi ĉiujn solvojn, ek de la 5-a (sept-akt.) numero.

AMUZAJ PROBLEMOJ (de Sro Jarlier)

SOLVO DE LA ANTAŬAJ PROBLEMOJ :

Onklo kaj nevo : respondo : Jes.

A kaj B estas ambaŭ vidvoj, kaj ĉiu el ili postlasas filinon : « a » filinon de A, kaj « b » filinon de B. A edzigas al « b » kaj havas filon C. B edzigas al « a » kaj havas filon D. C estas filo de A, do frato de « a », do onklo de D. C estas filo de « b », do frato de D, do C estas nevo de D.

Sekve, C estas samtempe onklo kaj nevo de D, kaj same D estas onklo kaj nevo de C.

Safistoj kaj ŝafoj :

Post vendo de 13 ŝafoj al la viandistoj restas al la du safistoj kune : 211 - 13 = 198.

La donaco de 5 ŝafoj de Petro al Paolo ne ŝanĝas la saman nombron da ŝafoj : ĉiu posedas la saman nombron, do la duonon : 198 : 2 = 99.

Paolo havis antaŭ la vendo kaj la donaco : 99 - 5 = 94 ŝafojn ; Petro havis : 99 + 5 + 13 = 117 ŝafojn.


NOVA PROBLEMO :

Paradokso. — Kiel oni povas demonstri $1 = 2$ Kial tiu rezonado estas malĝusta ?

BONHUMORO



— Kiom longaj estas la ferioj ?



— Via hotelo estas tute proksima. Tie !
Kontraŭe !



— Kie oni povas lerni la skiadon ?

Niaj perantoj

- Aŭstrio** : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (20 aŭst. ŝil.).
- Belgujo** : F-ino S. Obozinski, avenue Brugmann 364. BRUXELLES 18.
- Britujo** : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH (6 ŝil.).
- Nederlando** : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, Capelle aan den IJssel, ZH pĉk : 209721 (2,5 guld.).
- Germanujo (Okc.)** : S-ro Joseph Bode, (16) KASSEL-Ndzw, Silberbornstr, 33 - pĉk : Frankfurt (M) : 234-759 (3 mark).
- Germanujo (DDR)** : S-ro Ernst Muthschall, 19a HALLE (Saale), Am Bergmannstrost 18 - pĉk : Leipzig 510-28 (6 mark.).
- Hispanujo** : Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1^o, 1-a, BARCELONO (40 pes.).
- Italujo** : S-ro Claudio Pontedera, Via Marco Polo 3A, Verona (450 liroj).
Itala Esperanto-Federacio, Corso G. Galilei, 22, TORINO.
- Jugoslavio** : S-ro Lehotkay K. Ferenc, ul. Petefijeva 27, ZRENJANIN.
- Norvegujo** : S-ino Marit Delor, Oberstredesveg 56, LAMBERTSEDER (6 kr.).
- Danlando** : S-ino Bodil Neergaard, Gøthersgade 158, Kopenhago K (6 kr.).
- Pollando** : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (30 Zlotoj).
- Svedujo** : S-ro Rune Palmgren, Persikogatan 32 III, Stockholm-VALLINGBY (4 kron.).
- Svislando** : S-ro Pierre Metivier, Via Ferrera, Ascona (Tes.) (3 sv. Frank.).
- Usono** : S-ro C.S. Otto, 32 Hazelwood Rd., Bloomfield (N.J.) (1 dol.).
- Aliaj Landoj** : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (11 st.), aŭ respondkuponoj (8 respk.), per libroj, aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al S-ro Micard, Epineux-le-Séguin (Mayenne), Franc.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anonciĝajn

Akceptas :

- Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
- Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
- Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
- Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
- Por studi specialajn problemojn ;
- Por inter amikoj gaje libertempi ;
- Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo